# EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado


## Enhavo


- Irano atentindas
- Lernu per la taĝika kaj la kurda
- Vinilkosmo progresigas nian kulturon
- Nova Eŭropa Bulteno.



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2019-02 sendita el Budapeŝto la 12an de februaro.


*Al: Komitato, Sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Entute pli ol mil ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA.

## Irano meritas vian atenton kaj gastigas internacian kunvenon

Jen tre bonvena resumo pretigita de Henri Masson, el Francio: 'Estas bone kuraĝigi kaj subteni Esperanto-aktivadon en Irano, kie tio kreskas malgraŭ malfavoraj cirkonstancoj.Pri tio eblas legi sub "Plua ondo pri Lerno kaj Instruo en la urboj"

http://www.espero.ir/eo/plua-ondo-pri-lerno-kaj-instruo-en-la-urboj/

Post tro mallonga esperiga impeta periodo ĉirkaŭ 1978-1980 (do jam de ĉ. 40 jaroj!), Esperanto ree vigliĝas. La nuna retejo de Irana Esperanto-Asocio (IREA):




http://www.espero.ir/eo/?lang=eo

36-paĝa elŝutebla numero de *Irana Esperantisto*

http://www.espero.ir/revuo/IE-27.pdf kaj kaj la tuta kolekto: http://www.espero.ir/eo/revuo-e/?lang=eo

IREA akiris pasintjare novan sidejon en Teherano:

http://www.espero.ir/eo/nova-irea-oficejo/

La 12a mezorienta kunveno (MK) okazos en Kaŝano, Irano, de la 28a ĝis la 31 de marto 2019. Tiu aranĝo okazas sub la egido de la regiona Komisiono de UEA, Mez-Oriento kaj Nord-Afriko (MONA) Oni povas i.a. rimarki la kvaliton de la artikolo de Vikipedio pri Kaŝano, urbo ĉ. 200 km sude de Teherano.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Kaŝano

Eminenta ajatolo pozitive esprimiĝis pri Esperanto. Temas pri Sajid Mohammad Kazem Ŝariatmadari

https://eo.wikipedia.org/wiki/Sajid_Mohammad_Kazem_Ŝariatmadari

http://www.ipernity.com/doc/32119/40800732

Son-dokumento: "Ni ne lernas Esperanton por lukso, sed pro malsato pri novaj scioj" — D-ro M.H. Saheb-Zamani, laŭ artikolo de la januara numero de la revuo *Esperanto* de UEA en 1978:

http://www.ipernity.com/doc/32119/26106825

Pri kontaktato de ILEI Sirin Emrani :

https://esperantujo.directory/uzanto/simin-emrani

Estas en Irano talentaj desegnistoj, karikaturistoj, humuristoj, fotistoj, i.a. Reza Deghati : http://www.ipernity.com/blog/32119/297940

## Subteno por la reviviĝanta Centrazia regiono

"Danke al plurnacia kunlaboro en la kadro de la kontinentaj komisionoj de UEA kaj danke al subvencio de ESF aperis la kurda kaj taĝika versioj de la konata lernolibro de Stano Marĉek. Dankon al ĉiuj kunlaborintoj!" Tiel skribis Renato Corsetti, kiu prizorgas por UEA la regionon MONA – Mez-Oriento kaj Norda Afriko.  Li daŭrigas: "Cetere neniam antaŭe aperis lernolibro pri Esperanto en unu el la variaĵoj de la kurda lingvo. La apero de la lernolibroj, tamen, estas nur la komenco de la laboro. Nun oni devas trovi interesiĝantojn en tiuj regionoj kaj verŝajne oni devos sendi la lernolibrojn senpage konsidere de la ekonomia situacio. Ni provos ebligi tion per la Fondaĵo MONA ĉe UEA kaj per la helpo de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) rilate Taĝikujon. Helpo fare de ĉinaj esperantistaj kaj neesperantistaj instancoj en la kadro de la politiko 'La Zono kaj la Vojo' estus aparte bonvena." Pluraj landoj en tiu mondparto montras grandan deziron progresigi la movadon. Bonvenas apogo por certigi la bonan uzadon de tiuj novaj lerniloj.

## Vinilkosmo daŭre subtenas nian kulturan progreson

Aperis la 45a bulteno de Vinilkosmo. Informoj ĉe: vinilkosmo@esperanto.org
https://mail.google.com/mail/u/0/?hl=en#inbox/FMfcgxwBVWJSKkrNZHwrTrXprCGRKdnD

Nepre ni konsciiĝu pri la valora agado de Vinilkosmo kaj ni subtenu ĝin!
Legu:  https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/102-grava-alarmo.html

## Refoje Eŭropa Bulteno

Nova numero de Eŭropa Bulteno aperis che http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno
El la enhavo:

1. Spomenka Štimec -70-jara
2. Aŭguste en Triesto – la itala kongreso
3. Ni debatu la lingvan situacion en Eŭropo post la Briteliro
4. UEA kaj UN en 2019-2020 – multlingva kunlaboro
5. Mortis Baldur Ragnarsson
6. Tri kongresoj en Malago, Hispanio
7. Studsemajno en Kvinpetalo, Francio
8. Bolsonaro en Brazilo volas asimili indiĝenajn grupojn kun neportugalaj indiĝenaj lingvoj

Vortoj: 490

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.